

**JURA
TRIBUNO
INTERNACIA §**

N-ro 20

Jaro 2021 : 2

Internacia Jurista Esperanto-Asocio



Eldonita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta adreso: Jura Tribuno Internacia
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

ret-adreso: jurista@esperanto.ac

Direktoro: José M. Rodríguez
Kunlaborantoj: D-ino M^a Rafaela Urueña Álvarez (Hispanio)
Advokato Miguel Faria de Bastos (Portugaliao)
Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)

ENHAVO

Ĉu nova internacia ordo?	3
Vivo de la Asocio	5
La uzado de la forto laŭ la Internacia Juro	10
La humanaj koridoroj en la Internacia Juro	15
Juraj Informoj	20
Esperanto en la komenco kaj en la estonteco de la eŭropaj institucioj	26
Jura Vortaro: <i>Jurío</i>	41
Galerio de Elstaraj Juristoj	
<i>Hilary "Bill" Chapman</i>	43
Kino kaj Juro " <i>La Juĝisto</i> "	44
Aliĝo al IJEA	46



Ĉu nova internacia ordo ?

Post la rusa agreso kontraŭ Ukrainio, kompetentuloj pri internaciaj juro kaj rilatoj demandas sin, ĉu ni troviĝas antaŭ la fino de la internacia politika ordo konstruita de post la jaro 1945. Verdire, unu el la ŝtatoj, kiu subskribis la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj en tiu jaro, sur kies artikolo 2.4. agres-militoj estas kondamnataj, plenumis tion, agres-militon kontraŭ sendependa ŝtato kaj ties teritoria suvereneco, kaj sen ebla preteksto pri apliko de memdefenda rajto.

Tamen, estas necese agnoski, ke, se rilate fondintojn de Unuiĝintaj Nacioj, jam en la jaro 2003 Usono invadis Irakon, kun la senkulpigo pri ekzistantaj armiloj de amasa neniigo. Oni proponis tiam novan teorion pri "memdefenda rajto rilate ontajn minacojn". Hodiaŭ, Rusio ŝajne invokas tiun pretekston por pravigi sian agreson. Sed okulfrape, en la jaro 2003, kiam Usono atakis Irakon, kvankam okazis protestoj tra la tuta mondo, neniu avertis, ke la internacia politika ordo adoptita post la jaro 1945 endanĝeriĝis.



Irako 2003



Ukrainio 2022

Do, pro kio nun en 2022, kiam denove granda potenco atakas kaj invadas sendependan ŝtaton, ni ĉiuj ekpensas, ke la internacia politika ordo ŝanceliĝas? Verŝajne, pro la fakto, ke ĉi tiu agres-milito ne devas esti komprenata kiel izolita fakto. Lastatempe, militoj en Abĥazio, en Krimeo, en Sirio, en Libio, en Kazahio... pravas la fakton, ke io ŝanĝas, aŭ eble pli trafe diri "ion oni volas ŝanĝi", en la internacia ordo pri blokoj kaj influoj.

Tiel, laŭ fakuloj, ni troviĝas antaŭ nova internacia situacio kun tri gravaj polusoj: Usono, Rusio kaj Ĉinio. Kompreneble, la orienta potenco ne sentas sin komforta en internacia sistemo alies kreita en la jaro 1945, en kiu li ne estis aktiva ĉefrolulo.

Tamen, indas proponi novajn demandojn: ĉu tiu nova ebla internacia politika ordo povos esti konstruota surbaze de terura milito, kiu provokos milojn da mortoj kaj tutcerte milionojn da rifuĝintoj, fare de unu el la ĉefroluloj de la internacia sistemo? Ĉu tiu nova internacia sistemo povos travivi sur konstantaj defioj inter oriento kaj okcidento? Verdire ne. Se tiel, militoj ree okazos jaron post jaro okaze de nepraj alĝustigoj de blokoj kaj aliancoj.

Agres-milito povas esti la bazo de nenia inda konstruo. Do, en la nuna mondo, kie landlimoj iom post iom vanuas, dank' al internaciaj organizoj kaj al la propra ekzisto de reto kiu kapablas unuigi kaj komuniki la tutan homaron, neniuj povas taksi, ke agresio povas esti laŭleĝa agado de iu ajn ŝtato.

En tiu ebla nova internacia ordo, homoj devus esti la bazo por ties konstruo. Certe, militoj estas tiel antikvaj kiel la homaro mem, tamen tio okazis kiam alinaciaj homoj estis taksataj, unuavide, kiel malamikoj. Dank'al tutmondigo tiu ideo jam ekŝanĝiĝas. Nuntempe, estas eble interkompreniĝi kun homoj kiuj ne parolas nian nacian lingvon, jen la unua paŝo por ne taksi alian homon kiel malamikon. Trans landlimoj estas nur aliaj homoj kun kiuj ni povas konstrui ion stabilan. Espereble, ĉi tiu fia milito baldaŭ finiĝos kaj ties respondeculoj juĝotaj ĉe internacia senpartia kortumo. Tio ja estas defio por la tuta homaro kaj eble la unua paŝo por forigi militojn. Verŝajne tiu revata nova internacia ordo alvenos iam, kaj en ĝi paco, demokratio kaj respekto devas esti nepraj postuloj.





Vivo de la Asocio

DEKLARACIO DE LA ESTRARO DE INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO OKAZE DE LA AGRESO DE RUSIO KONTRAŬ UKRAINIO

Depost la jaro 1945 la internacia komunumo havigis al si, pere de Unuiĝintaj Nacioj, taŭgan instrumenton por disvolvi inter la nacioj amikajn rilatojn bazitajn sur la respekto de la principo de egaleco de la rajtoj de la popoloj kaj de ilia rajto disponi pri si mem, kaj fari ĉiajn aliajn disponojn taŭgajn por solidigi la pacon de la mondo, laŭ la artikolo 1-a de la Ĉarto subskribita en la urbo San-Francisko en tiu jaro.

Same, la artikolo 2.1 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj proklamas, ke la membroj detenas sin, en siaj internaciaj rilatoj, je minaco aŭ uzo de forto, ĉu kontraŭ la teritoria integreco aŭ politika sendependeco de ia ajn ŝtato, ĉu en ia alia maniero malkongrua kun la celoj de la Unuiĝintaj Nacioj. Pro tio, agresmilito ne povas esti akceptata en nia mondo, des pli se oni scias, ke ekzistas nukleaj armiloj kapablaj detrui kelkfoje la tutan homaron.

Pro ĉi ĉio, IJEA, kiu proklamas en sia celaro strebi al justeco, laŭleĝeco, efektivigo de la homaj rajtoj kaj la demokratio en la mondo, rifuzas kaj kondamnas la ĵusan agreson realigitan de Rusio kontraŭ Ukrainio, ĉar ĉi tiu agado tute ne kongruas kun la principoj de Unuiĝintaj Nacioj, internacia asocio kie Rusio ĉefrolas, sed hodiaŭ ĝi ŝajnas forgesi ilin.

IJEA alvokas por tuja paco en Ukrainio, por ke ukrainoj, rusoj kaj ĉiuj najbaraj popoloj povu vivi en paca etoso. Nia asocio ankaŭ solidarecas kun ĉiuj viktimoj, speciale kun la plej etaj kiuj vidas, ke normala vivo en familio kaj lernejoj haltas kaj, por savi siajn vivojn, ili devis ekigi malfacilan vojon por atingi rifuĝon en najbaraj landoj – senfinan dankemon al tiuj ŝtatoj kiuj bonvenigas kaj akceptas ilin – .

IJEA, kompreneble, ne prenas politikajn poziciojn, tamen hodiaŭ ne temas pri politika disputo, sed pri milit-agreso tute kontraŭa al la Internacia Juro kaj al la paca kaj kunlaborema spirito kiu devas regi la internaciajn rilatojn.

Laste, IJEA alvokas al ĉiuj instancoj, speciale al la Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj, ĉesigi la militon; al najbaraj landoj akcepti ĉiujn rifuĝintojn kiuj devis foriri el sia lando por savi siajn vivojn; kaj al la Prokurorojo de la Internacia Puna Kortumo por pristudi la terurajn okazintaĵojn kiuj povus esti plenumitaj dum ĉi tiu milit-agreso, kaj la respondecon de la agresantoj.

*La Estraro de Internacia Jurista Esperanto-Asocio
Lisbono, la 28-an de februaro 2022.*



NOVA PROJEKTO DE IJEA: JURA SEMAJNO

En la pasinta monato novembro IJEA ekigis novan eldonan projekton, sendube tre ambicia, ĉar ties celo estas eldoni ĉiusemajne malgrandan bultenon kun juraj informoj kaj kun pristudo de vorto rilata al juro. La kompromiso regule aperigi tiun bultenon realiĝas semajnon post semajno, tiel ĝis nun pli ol 25 numeroj jam aperis. Rilate la sendon de la bulteno, ĝi okazas nur rete, do, ne temas pri presita revuo. Ricevantoj estas membroj kaj simpatiantoj de nia jura asocio, kvankam ĝi estas tute malfermita al ĉiuj interesitoj.

La juraj informoj aperantaj estas kiel eble plej aktualaj, do, temas pri komentarioj pri ĵusaj juĝoj aŭ procesoj sufiĉe gravaj por esti diskonigitaj. Rilate vortojn, la celo estas klarigi la uzon de tiuj vortoj en juraj medioj. Tutcerte ĉi tiu projekto daŭros dum la jaro 2022. Se Vi deziras ricevi la bultenon, bv. kontakti kun nia asocio.




Internacia Jurista Esperanto-Asocio



Suprema Kortumo de Kanado en Otavo





Quod tibi no vis fieri, alteri ne feceris

Christian Thomas (1655 / 1728)

Tion, kion vi ne deziras por vi, ne faru al aliaj.

La uzado de la forto laŭ la Internacia Juro



Alejandro Burgos Escalante
Hispanio

24-a de februaro de la 2022-a jaro de la komuna erao: Rusio lanĉas atakon kontraŭ Ukrainio. Dum multaj jaroj, ni estis (kaj bedaŭrinde plu estas) atestantoj de invadado de landoj disde aliaj landoj: Vjetnamio, Afganio, Irako kaj, nun, Ukrainio. La listo, fakte, estas senfina. Sed, rilate al ĉio ĉi, kion diras la Internacia Juro?

Unue, ni komencu per fundamenta principo troviĝanta en la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj: «La membroj solvas siajn internaciajn disputojn per pacaj rimedoj, tiel ke la paco kaj la internacia sekureco kaj la justeco ne estu endanĝerigata» (art. 2.3). Ĉi tiu principo estas baza por kompreni la uzadon de forto laŭ la Internacia Juro. Laŭ la antaŭa artikolo, la disputojn oni solvu per pacaj rimedoj: «[...] per intertraktado, esplorado, perado, kompromiso, arbitraciado, tribunala decido, uzado de regionaj institucioj [Eŭropa Unio, ekz.] aŭ interkonsentoj aŭ per aliaj pacaj rimedoj de propra elekto» (art. 33).



Usonaj soldatoj en Vjetnamo.

En la Ĉapitro 6-a de la Ĉarto, oni trovos manierojn pace solvi la internaciajn disputojn. Tamen, ni devas aldoni gravegan principon, kiu estas nepraĵo rilate al ĉi tia temo: «La membroj detenas sin, en siaj internaciaj rilatoj, je minaco aŭ uzo de forto, ĉu kontraŭ la teritoria integreco aŭ politika sendependeco de ia ajn ŝtato, ĉu en ia alia maniero malkongrua kun la celoj de la Unuiĝintaj Nacioj» (art. 2.4). Ĉi tiu artikolo, fakte temas pri *ius cogens* kaj samtempe pri laŭmora normo (Kazo rilate al la armeaj kaj paraarmeaj agadoj en kaj kontraŭ Nikaragvo; Nikaragvo kontraŭ Usono). Aldone, la Rezolucio 2625 (XXV) de la Ĝenerala Asembleo enhavas jenon rilate al la uzado de forto: «Nepras, ke ŝtatoj solvu siajn internaciajn disputojn per pacaj rimedoj laŭ la Ĉarto». Estas aliaj rezolucioj gravaj rilate al la uzado de forto: Rezolucio 3314 (XXIX) kaj Rezolucio 42/42, ĉi tiu lasta treege grava. Efektive, la uzado de forto estas malpermesita laŭ ĉio, kion ni ĵus legis. La Ĉarto preferas, ke internaciaj disputoj estu solvitaj per pacaj rimedoj (art. 2.3 kaj Ĉapitro 6-a) kaj ne pere de perforto (art. 2.4). Tamen, la realo estas pli proza, kiel diradis eminenta profesoro al mi.



Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj

Se vi studas (aŭ studis) Juron vi certe scias, ke la plej grava vorto en la vortprovizo de juristo estas «dependas». Ĝenerale, la uzado de forto estas malpermesita. Tamen, en la Ĉarto troviĝas esceptoj, kiujn ni detale priskribos. La subteno de la esceptoj estas la art. 51: memdefendo-rajto. Tia rajto estas grava. Se lando A estas atakata de lando B, lando A rajtas defendi sin mem. Rimarkendas, ke povas esti kolektiva defendado, kiel ekzemplo ni havas faman organizon: NATO (Nord-Atlantika Traktat-Organizo). La defendanta lando devas informi prie al la Konsilantaro pri Sekureco. Aldone, la defendado devas esti kaj necesa kaj proporcia.

Alia escepto rilatas al Konsilantaro pri Sekureco. La artikolo 42 diras: «se la Konsilantaro pri Sekureco opinias, ke la disponoj laŭ la artikolo 41 estus nesufiĉaj aŭ montriĝus nesufiĉaj, ĝi povas per aeraj, maraj aŭ teraj militfortoj realigi la disponojn necesajn por konservado aŭ restarigo de la monda paco kaj de la internacia sekureco. Tiuj disponoj povas inkludi demonstradojn, blokadojn kaj ceterajn operaciojn de la aeraj, maraj aŭ teraj militfortoj de Membroj de la Unuiĝintaj Nacioj». Ĉio ĉi signifas, ke la Konsilantaro pri Sekuro povas lanĉi atakojn kontraŭ landoj, kie paco ne plu ekzistas. Ni havas multege da ekzemploj: Korea Milito (1950), Gofa Milito (1990), Haitio (2004) kaj Libio (2011), i.a. Tamen, membroj de UN iniciatis intervenojn en landoj sen la aprobo de la Konsilantaro pri Sekureco: NATO en Kosovo (1999) estas la plej okulfrapa ekzemplo, sed ankaŭ troviĝas aliaj konfliktoj kiel la Militoj de Afganio (2001) kaj Irako (2003). Multaj juristoj, fakte, opinias, ke la antaŭe menciitaj militoj estas kontraŭleĝaj.



Soldatoj de Unuiĝintaj Nacioj en
Centr-Afrika Respubliko

Laste, sed ne balaste, ni ne forgesu la Porpacajn Operacojn de Unuiĝintaj Nacioj. Ĉi tiaj operacoj celas restarigi kaj konservi la pacon kaj la sekurecon. La unua Porpaca Operaco estis lanĉita en la jaro 1956 por finiĝi la t.n. Suezan Krizon (ankaŭ nomata Sinaja Milito aŭ Sueza Milito), kiu estis konflikto inter Egiptio kaj la koalicio konsistanta el Israelo, Francio kaj Usono. Egiptio tiam ŝtatigis la kanalon kaj la Koalicio invadis la landon. Tiamaniere, eksplodis la milito. Ekde tiam la Porpacaj Operacoj estis lanĉitaj en multaj lokoj de la terglobo: Okcidenta Saharo, Israelo, Haitio, Kipro kaj Sirio, i.a. La Konsilantaro pri Sekureco havas la povon krei Porpacan Operacon. En tiaj rezolucioj, troveblas interesaj datumoj, kiel la tempodaŭro kaj la loko, kie la operaco estos lanĉita. Ĉiuj landoj devas nepre obei la rezoluciojn de la Konsilantaro pri Sekureco

(art. 25). Se vi scivolemas, vizitu jenan retpaĝon por scii kiamaniere estas lanĉitaj la Porpacaj Operacoj: <https://mallonge.net/m9> (havebla hispane, arabe, ĉine, france, ruse kaj angle).

Kompreneble, oni povas trovi aliajn traktatojn aŭ paktojn, kiuj parolas pri la uzado de forto (antaŭaĵoj de la nuna Ĉarto): Pakto de Briand-Kellogg (1928), Pakto de la Ligo de la Nacioj (1919) kaj Traktatoj de Hago (1907). La lasta gravas tial, ke ĝi enhavas limigojn pri la uzado de forto (Ĉapitroj 2-a) kaj pacajn solvojn de la konfliktoj (Ĉapitro 1-a). Oni ne devas senvalorigi ĉi tiujn traktatojn: ili influis multege, i.a. la Ĉarton de la Unuiĝintaj Nacioj.

«Ni, la popoloj de la Unuiĝintaj Nacioj - firme deciditaj, **gardi generaciojn kontraŭ la plago de milito, kiu dufoje dum nia vivotempo alportis nedireblan suferon al la homaro, denove konfirmi nian kredon je la fundamentaj rajtoj de la homo [...]**».

Antaŭparolo de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj

REFERENCOJ:

Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Havebla (esperante) ĉe: <https://mallonge.net/lp>

Kazo rilate al la armeaj kaj paraarmeaj agadoj en kaj kontraŭ Nikaragvo; Nikaragvo kontraŭ Usono. Havebla (hispane) ĉe: <https://mallonge.net/m8>

Rezolucio 2625 (XXV). Havebla (hispane, arabe, ĉine, france, ruse kaj angle) ĉe: <https://mallonge.net/lo>



Ĉu vi estas flag-amanto?

Se jes, **VENTO** interesas al Vi.

VENTO estas la sola revuo en esperanto pritraktanta temojn pri veksilologio (flago-scienco).

Ĝi aperas tri-foje en la jaro kaj temas pri revuo libere alirebla. Vi povas legi ĉiujn numerojn ĉe:

www.esperanto.ac/vento



Justica Palaco en Montrealo (Kanado)



La humanaj koridoroj en la Internacia Juro

La kordova Moseo Majmonido, studinte la Talmudon, skribis en la 12-a jarcento p.K. jenon:

“Kiam armeo sieĝas vilaĝon kun la celo konkeri ĝin, ĝi ne devas ĉirkaŭigi la lokon en ties kvar flankoj, sed nur en tri, kaj tiel permesi la eskapon de tiuj kiuj deziras savi siajn vivojn”.

Okulfrape, la vidpunkto de la hebrea filozofo estas tiu de rifuĝinto, ne de generalo, ĉar militisto neniam ĉirkaŭigus urbon nur en tri el ties flankoj, verdire tio eĉ ne estus ĉirkaŭigo. Tamen, la elpenso de la kordova rabeno montras al ni, ke jam en la 12-a jarcento, oni agnoskis, ke oni devis rigardi la civilulojn kiel ne-kombatantojn okaze de milito.



Statuo en Kordovo (Hispanio) de Moseo Majmonido (Kordovo 1138, Kairo 1204), hebrea rabeno, teologo kaj filozofo.

De tiu epoko, kaj eĉ antaŭe, ĝis la 19-a jarcento, la ĉeesto de civiluloj en sieĝita urbo estis konsiderata kiel milita avantaĝo por la ĉirkaŭiganta armeo. Do, la ebla eliro de tiuj ne-kombatantaj civiluloj estus profitodona por la sieĝitoj kaj malavantaĝo por la sieĝantoj. Sciante, ke la abundo de civiluloj en tiu urbo malpliigus la provizojn (manĝaĵojn, akvon kaj medicinojn) de la defendantaj soldatoj, kio estis ege konvena por la sieĝantoj.

Ekzemple, okaze de la milito ruso-turka de la jaroj 1877-1878, la rusa marŝalo Goruko ordonis al la civiluloj, kiuj ekforiris el la urbo Plevna reveni tien. Same, okaze de la Nurembergaj Procesoj, oni akceptis la,

ekde tiam nomata, “doktrinon von Leeb”. Wilhelm von Leeb (1876-1956) estis germana marŝalo, li estris la germanan armeon okaze de la sieĝo al la urbo Leningrado. Dum tiu atako la germana armeo neniam permesis la eliron de rusaj civiluloj, tio kaŭzis grandan kvanton da mortintoj inter la ne-kombatantoj pro malsato kaj militaj agadoj. Akuzita de tiu ebla milita delikto en Nurembergo, la tribunalo fine devis absolvi lin de tiu delikto, ĉar li sukcesis pruvi, tiu estis ofta strategio en ĉiuj armeoj okaze de sieĝoj.

Tamen, ekzistas ekzemploj pri kontraŭaj militaj aktoj. Tiel, okaze de la hispan-usona milito en la insulo Kubo en la jaro 1898, la usona armeo permesis la eliron de civiluloj antaŭ ol bombardi la urbon Santjago. Same, japanoj, dum la rus-japana milito en la jaro 1905, proponis la eliron de ne-kombatantoj el la urbo Port Arthur. Do, kvankam verdire temis pri antikva kaj akceptata strategio, ekde la komenco de la 20-a jarcento oni permesas kaj eĉ faciligas la eliron de civiluloj el sieĝitaj urboj fare de la sieĝanta armeo. La proceso mem kontraŭ la marŝalo von Leeb kiu ne efektivigis tiun akton, kvankam fine absoluta, estas pruvo, ke temas pri akceptata praktiko en la lastatempaj militoj.



Civiluloj eliras el sieĝita urbo en Sirio, sub la rigardo de sieĝanta armeo

Tiel, la homarana internacia juro proklamas, ke dum konflikto ĉiuj armeoj, ĉiuokaze, devos distingi inter kombatantoj kaj civiluloj, kun la celo respekti la vivon kaj havaĵojn de la civiluloj. Civiluloj ne povas esti damaĝitaj. Nur la kombatantoj, tio estas militaj defendantoj, povos esti atakataj en sieĝita urbo. Ĉar akceptite, ke civiluloj troviĝantaj en sieĝita urbo elektis loĝi tie, sed temas pri la naturaj enloĝantoj de loko, kiu antaŭ la konflikto ne estis batal-kampo.

Pro tio, la rajto de atakanto dum sieĝo ne estas absoluta, ĉar li devas unue peti la kapitulacon de sieĝitoj kaj poste, se ne akceptata, oni devos nepre permesi la evakuon de civiluloj tra la tiel nomataj “*humanaj koridoroj*”.

Ĉi-sence, la artikolo 70-a de la Unua Aldona Protokolo al la Konvencio de Ĝenevo de 1949, rilata al al protektado de viktimoj de la internaciaj armaj konfliktoj, de la jaro 1977, disponas ke:

“1. Kiam civiluloj en kiu ajn teritorio, ne-okupita, troviĝas sub la kontrolo de unu el la partioj en la konflikto kaj ili ne disponas pri sufiĉaj provizoj el tiuj menciitaj en la artikolo 69-a¹, akorde kun la militantaj partioj plenumiĝos homaranaj kaj senpartiaj help-agadoj. La havigo de tiuj helpaĵoj ne estos rigardata kiel enmiksiĝo en la konflikto, ankaŭ ne kiel malamika agado. Dum la distribuado de la help-sendaĵoj havos prioritaton infanoj, gravedulinoj, ĵusnaskintulinoj kaj mam-nuntrantinoj, akorde kun la 4-a Konvencio de ĉi tiu Protokolo”.

Same, la artikolo 23-a de la Ĝeneva Konvencio Celanta Mildigi la Situacion de Vunditoj kaj Malsanuloj de la Kombatantaj Armeoj, de la jaro 1949, disponas la aranĝon de specialaj lokoj, kie vunditoj estos protektitaj okaze de milito. Do, eĉ meze de la plej terura milito aŭ sieĝo povas ekzisti lokoj kie civiluloj kaj vunditoj restus en sendanĝera situacio. Certe, por krei tiujn koridorojn estas nepra la akcepto de ambaŭ armeoj, sieĝantoj kaj sieĝitoj. Tamen, la ne-akcepto de unu, aŭ de ambaŭ armeoj, povas esti anstataŭigita de la Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj, ekzemple, la Rezolucio 2328 (2016) pri evakuado de civiluloj el la siria urbo Alepo kaj la aranĝado de humanaj koridoroj al Irako, Jordanio kaj Turkio.



Civiluloj en la milito de Sirio

1 Tio estas: nutro-provizoj, medicinaĵoj, vestaĵoj kaj lito-tukoj.

La unua mencio pri la koncepto “humanaj koridoroj” aperis en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, okaze de la rezolucio 45/100 de la 14-a de decembro de 1990. Poste, la Instituto pri Humana Juro de San Remo redaktis informon sub la titolo “Principoj sur kiuj enkondukas la rajto je humana asistado”, ene de tiu informo oni proponas la neceson havigi helpon al viktimoj de militaj konfliktoj pere de specialaj lokoj, sub la nomo “*humanaj koridoroj*”, kiuj devas esti respektataj kaj protektataj de ĉiuj kombatantoj, kaj se necese, sub la administrado de Unuiĝintaj Nacioj (Principo 10, alineo2).

Ĉi tiuj koridoroj estus difinitaj laŭ 5 limoj²:

1) Rilate la tempon: estas necese difini la momenton kiam tiu koridoro povus esti uzata, ĉu por faciligi la evakuadon de civiluloj, ĉu por provizi per bezonaĵoj al civilaj sieĝitoj.

2) Rilate la spacon: estas necese precizigi la plej rektan linion inter la sieĝita loko kaj la cel-loko.

3) Rilate la objekton: estas necese klarigi kiu rajtas transiri tiun koridoron aŭ kiuj provizoj povas esti havigitaj al sieĝitoj.

4) Rilate la celon: la aranĝado de tiuj koridoroj ne povos atenci la pacon, la ordon aŭ la sekurecon.

5) Rilate la senpartiecon: la koridoroj ne povos esti uzataj de unu el la kombatantoj por ties milita profito.

Profesoro Bettati proponas ankaŭ jenan klasifikon de tiuj koridoroj:

a) Celantaj havigi provizaĵojn al civiluloj.

b) Celantaj faciligi la evakuon de civiluloj en danĝeraj situacioj.

c) Celantaj faciligi la alvenon de rifuĝintoj.

Alie, malgraŭ la fakto ke la plej alta celo de tiuj koridoroj estas la savo de civiluloj ene de milit-konflikto, estas necese aserti, ke la aranĝado de tiuj sekuraj lokoj povus esti komprenata kiel garantio por la kombatantoj. Tiel, ambaŭ armeoj povus esti senŝarĝiĝi de kiu ajn respondeco rilate atakojn kiuj povas kaŭzi rekte aŭ malrekte damaĝojn al civiluloj, kondiĉe ke ili, antaŭe faciligis kaj ebligis la eliron de tiuj civiluloj en la sieĝita urbo.

2. Laŭ propono de la Prof. Mario Bettati en “*Derecho de Injerencia Humanitaria o derecho de libre acceso a las víctimas*” en LA REVISTA (hispanlingva eldono). Eld. Comisión Internacional de Juristas, n-ro 49, decembro 1992. Ĝenevo (Svisio).

Resume, estas eble vidi, ke okaze de la lastatempaj militaj konfliktoj urboj fariĝis batal-kampo. Tamen, neniel, enloĝantoj de tiuj urboj povas esti rigardataj kiel kombatantoj aŭ kiel ostaĝoj, ili estas nur tio: civiluloj kiuj loĝis de ĉiam en tiu urbo. La Internacia Homarana Juro jam superis tiun malnovan vizion de la rifuĝintoj, akceptita en Nurembergo, kiel ĝenanta elemento en sieĝita urbo, hodiaŭ pleje gravas la sekureco de la ne-kombatantoj, kiu devas esti certigita de ĉiuj armeoj, eĉ se tio provokas militan malavantaĝon al unu el ili, kaj cele al tio la difino kaj aranĝado de humanaj koridoroj meze de sieĝo estas nepra postulo de la internacia humana juro.

José María Rodríguez Hernández
Hispanio



Civiluloj meze de atakoj de Rusio kontraŭ Ukrainio



Juraj Informoj

- **Unuafoje la Internacia Kortumo de Unuiĝintaj Nacioj debatas pri insultoj.**

En septembro 2020 okazis kombatoj inter la armeo de Armenio kaj Azerbajĝano pro la kontrolo en la regiono Montara Karabaĥo. La lukto finiĝis kun 5.000 viktimoj kaj la deplojado de 2.000 rusaj soldatoj, agantaj kiel paca armeo inter la trupoj de tiuj ŝtatoj.

Post tio, kaj Armenio kaj Azerbajĝano prezentis plendon antaŭ la Internacia Kortumo kun la celo denonci malobservojn de la paca akordo. Ambaŭ partioj uzis akrajn esprimojn por difini la kontraŭan partion. Ĉi tio devigis al la Internacia Kortumo, ene de malofta decido, ordoni al ambaŭ ŝtatoj haltigi kaj eviti rasan haton dum la pristudo de la kazo en la tribunalo.



La juĝistoj de la Internacia Kortumo ne elstaris la insultajn esprimojn de unu aŭ alia partio, ili nur konsideris nepre eviti tiujn vortojn, kiuj povas favori la rasan hatadon de ambaŭ popoloj. Laŭ la kortumo, diskursoj plenaj je abomenaĵoj povas eliri el ĉiaj socioj, demokratiaj aŭ aŭtoritataj, sed en ĉiuj

kazoj la uzo de tiaj esprimoj minacas la homajn rajtojn, ĉar ili antaŭenpuŝas diskriminacion, rasismojn kaj ili malfaciligas la ĝustan uzadon de la esprim-libereco. Tiel, eldirataj okaze de politikaj diskursoj aŭ uzataj en sociaj retejoj, tiuj vortoj nur provokas ne-toleremon kiu povas esti la kaŭzo de perfortaj agoj.

La Kortumo komprenas, ke estas malfacile sukcesi en la atingo de tiu celo, tio estas la evitado de publikaj insultoj, tamen estas espereble, ke almenaŭ ĉe oficialaj instancoj oni devas malaltigi tiun streĉitecon inter ambaŭ ŝtatoj. Inter la esprimoj eldiritaj, aperas tiuj de la prezidento de Azerbajĝano asertanta, ke la armenoj estas *banditoj, vandaloj, faŝistoj, barbaroj, ne-fideluloj en nigraj vestaĵoj, malamikoj, malkuraĝuloj kaj bestoj*. Kontraŭe, la oficiala novaĝ-agentejo *ArmenPress* konsideris la azerbajĝananojn kiel *barbarojn kiel turkojn, ne meritantaj ekzisti sur la tero*. Ĉi tiuj esprimoj estas menciataj kaj kritikataj de la juĝistoj de la Internacia Kortumo, kiu bazis sian antaŭ-juĝon sur la Konvencio por la Forigo de Rasa Diskriminacio, subskribita kaj de Armenio kaj de Azerbajĝano.

Post la malapero de Sovietunio en la jaro 1991, Armenio kaj Azerbajĝano luktis cele la posedon de la regiono Montara Karabaĥo, kiu fine restis sub armena suvereneco. En la jaro 2016 okazis la tiel nomita “Kvar-taga Milito”, kiu kaŭzis pli ol 200 viktimojn. Poste, en la jaro 2020, post mallonga milito Azerbajĝano rekuperis la plej grandan parton de la regiono, post akordo subskribita inter ambaŭ ŝtatoj kun la mediacio de Moskvo.

• La komunikaĵoj en tujmesaĝilo ne estas absolute privataj, laŭ la Kolombia Konstitucia Tribunalo.

La Konstitucia Tribunalo de Kolombio klarigis en juĝo kian nivelon de konfidenco povas ĝui mesaĝoj en tujmesaĝilo. La proceso komenciĝis kiam laboristo estis punita de entreprenisto, kaŭze de mesaĝo sendita de li ene de privata grupo de la tujmesaĝilo *Whatsapp*. En tiu komunikaĵo li kritikis la entrepreniston, kiu post scii pri la mesaĝo punis lin per 3 tagoj sen salajro.

Reage al tiu puno, la laboristo prezentis plendon en juĝa instanco, ĉar li konsideris, ke la mesaĝo estis tute konfidenca kaj pro tio la entreprenisto ne rajtis uzi ĝin, ĉar ne sendita rekte al li. Juĝo en tiu unua instanco pravigis la reason de la entreprenisto, ĉar ne ekzistis malrespekto al la intimeco de la homo kiu eldiris la mesaĝon. En la dua instanco, la Konstitucia Tribunalo tion mem asertis. La juĝo de tiu altranga kortumo klasifikas la lokojn kie estas eble esprimi opiniojn laŭ tri kategorioj.

Unue, estas eble konsideri privataj lokoj, kie neniuj rajtas enmiksiĝi, ekz. la propra hejmo. Aliaj kategorio estas tiuj publikaj lokoj kie mesaĝo estas dissendita, en tiuj ejoj ĉiuj povas ricevi mesaĝon, do, ne povas kvalifiki kiel enmiksiĝo en la intimito de homo, se publika mesaĝo estas lanĉita en tiu loko.

Meze de ambaŭ kategorioj aperas tiuj lokoj, kiuj havas samtempe karakterojn de publikaj kaj privataj lokoj, tio dependos de kiom da homoj troviĝas en tiu ejo. Unu el tiuj lokoj estas grupo en tuĵmesaĝilo, la juĝo de la Konstitucia Kortumo de Kolombio asertas, ke se temas pri grupo kun malgranda nombro da partoprenantoj, tiam ni troviĝas antaŭ privata loko, tamen des malpli privata ĝi estas, ju pli granda estas la partoprenantaro. Paralele, la intimito de tiu, kiu eldiras mesaĝon, malpli iĝas kiam pliaj homoj povas legi ĝin, ĉar opinioj diskonigitaj en tiu mez-publika loko povas havi gravajn sociajn resonancojn.



Laŭ la kolombia kortumo, laborejo estas duon-privata ejo, kiu ne povas ĝui tiel grandan nivelon de intimito kiel la propra hejmo. Do, grupo ĉe tuĵmesaĝilo en kiu partoprenas preskaŭ ĉiuj laboristoj de entrepreno, ne povas esti taksata kiel esence privata loko, ĉar multaj homoj, kaj ne malgranda aro da ili, povas legi, respondi, opinii kaj aŭskulti mesaĝojn. Pro tio, mesaĝoj en tiu grupo ne povus esti konsiderataj kiel familiaraj aŭ hejmeaj eldiraĵoj, sed kiel opinioj diskonigitaj en sufiĉe granda grupo. Tiuj argumentoj ebligis al la Kortumo aserti, ke la entrepreno ne malrespektis la rajton je intimito de la laboristo, kiam ĝi, surbaze de mesaĝoj en grupo de Whatasapp, punis la laboriston.

- **Norvega Supera Tribunalo kondamnas la aĉeton de infana blov-pupino kun seksaj celoj.**

La Supera Tribunalo de Norvegio konfirmis juĝon de unua-istanca juĝisto, kiu rigardis kiel delikton la importadon kaj posedon de blov-pupino kun infana mieno kaj volumeno, pro la fakto, ke la reprezentado de infanoj kun seksaj celoj estas punata de norvega leĝo.



Fine de la jaro 2020 Yuri Tolochko, rusa korpokulturisto kaj aktoro edziĝis kun sia blov-pupino Margo.

La afero ekiĝis, kiam oni eltrovis en norvega dogano la alvenon de blov-pupino, havanta staturon proksimume 100 cm. La pupino estis aĉetita de 45-jaraĝulo pere de interreto en Honkongo. Norvega leĝo malpermesas la reprezentadon de infanoj kun seksaj celoj, pro tio en la unua juĝa instanco, la aĉetanto de la blov-pupino ricevis punon de 10.000 norvegaj kronoj kaj 60 tagoj de mallibero. La advokato pledis, ke tiu blov-pupino ne povus esti konsiderata kiel infana reprezentaĵo, tamen la norvega Supera Tribunalo decidis, ke *“la formo kaj la proporcioj de la pupino estis similaj al tiuj de infano”* kaj laŭ kelkaj elementoj de la pupino, estis facile vidi, ke ĝi estis dezajnita kun seksaj celoj.

La advokato ankaŭ argumentis, ke tiu blov-pupino povus esti taŭga rimedo por eviti seksajn perfortojn al realaj infanoj. Kontraŭe, norvega polico sciigis, ke la aĉetado de ĉi tiuj produktoj kreskas tagon post tago, kun la danĝero, ke post la uzo de tiuj infan-aspektaj blov-pupinoj ties uzantoj dezirus sekse perforti realajn infanojn.



**Kio estas la Internacia Jurista
Esperanto-Asocio ?**

JURA
TRIBUNO
INTERNACIA §

Num. 18
Juro 2019
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Jura Tribuno Internacia
Oficiala organo de IJEA

www.esperanto.org



Juraj Universalaj Tekstoj

Ĉi tie vi trovos la tradukon en Esperanton de gravaj internaciaj juraj tekstoj.



Libroj eldonitaj

Inter la celoj de IEAJ troviĝas la publikigo en Esperanto de verkoj rilataj al juro.



Statuto de IJEA

Valida ekde la aprobo de la asemblea kunsido de 24.07.2016 okazigita en Nitro (Slovakio)



Vortaro

Jura Terminologio



Kursoj

- Kurso pri Internacia Mar-Juro

ntojuro.org



Nia celaro

Jen la celoj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.



Fariĝu membro de IJEA !

Se vi laboras aŭ rilatas al juraj medioj, ne hezitu: vi povas ĉef-rolu en IJEA.



Estraro de IJEA

Esperanto en la komenco kaj en la estonteco de la eŭropaj institucioj

José María Rodríguez Hernández
Hispanio

La dua mond-milito provokis preskaŭ kompletan detruon de Eŭropo. Tiam, la eŭropaj politikistoj, almenaŭ tiuj de la okcidenta regiono, komprenis, ke la estonteco de la kontinento necesigis kooperadon kaj alproksimiĝon, se ne eĉ integriĝo, de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj cis la Fera Kurteno¹.

La milito ne nur kaŭzigis troan kvanton da mortintoj kaj la detruon de multaj eŭropaj urboj, kune kun la nuligo de industrioj kaj ruinigo de la kamparo, ĝi ankaŭ ŝanĝis la mondan ordon pro la apero de du novaj superpotencoj, Usono kaj Sovetunio, kiuj ĉefrolis en la eŭropa scenejo de post la jaro 1945.



Germana urbo tute detruita dum la Dua Mondmilito

La Konsilio de Eŭropo

En la jaro 1948 Francio, apogita de Belgio, proponis la starigon de eŭropa asembleo kun vasta agad-kampo, konsistanta el parlamentanoj de la ŝtato-membroj, sed sendependaj el ili. La ideon rifuzis Britio, kiu apogis la

¹ Okaze de prelego de la brita politikisto Winston Churchill la 5-an de marto de 1946 en Fulton (Usono), li uzis la esprimon “Fera Kurteno” por nomi la dividon inter la komunistaj nacioj de orienta Eŭropo kaj tiuj ne-komunistaj de okcidenta Eŭropo dum la Malvarma Milito.

ekziston de asembleo sed nur kun konsultiĝaj funkcioj. Konversacioj daŭriĝis kaj tiel, en monato januaro 1949, la ministroj pri eksterlandaj aferoj de kvin okcident-eŭropaj ŝtatoj² renkontiĝis en Londono, tiam ili akceptis krei konsilon. En tiu konsilo renkontiĝos ministroj en privataj sesioj kaj parlamentanoj, kun konsultiĝaj funkcioj. Tiuj parlamentanoj estas tute sendependaj, do la registaroj de la ŝtatoj al kiu ili apartenis ne povos influi sur iliaj decidoj kaj agadoj.

Parlamentanoj rajtis voĉdoni spite al aliulaj voloj kaj kompreneble, laŭ demokratiaj principoj. Fine, la 5-an de majo de 1949 en Londono dek ŝtatoj³ decidis fondi la “Konsilion de Eŭropo”, post kelkaj monatoj aliĝis Grekio kaj Turkio kaj en la jaro 1950 Germanio⁴. La ĉefa celo de ĉi tiu internacia organizo estis stimuli kaj certigi la demokratiajn principojn en Eŭropo, komuna havaĵo de ĉiuj eŭropanoj, favorigi la socian kaj ekonomian progreson de la kontinento kaj plifirmigi la efektivigon de la homaj rajtoj kaj la fundamentaj liberecoj.



Sidejo de la Konsilio de Eŭropo en
Strasburgo (Francio)

Se paroli pri la Konsilio de Eŭropo el la lingva vid-punkto, la artikolo 12-a de la Traktato de Londono de la 5-a de majo de 1949 proklamas jenon:

Artikolo 12. La oficialaj idiomoj de la Konsilio de Eŭropo estas la franca kaj la angla. Internaj reglamentoj de la Komitato de Ministroj kaj de la Konsultiĝa Asembleo decidis pri la cirkonstancoj kaj kondiĉoj en kiuj aliaj lingvoj povos esti uzataj.

2 Tiuj ŝtatoj estis Britio, Francio, Belgio, Nederlando kaj Luksemburgio. Ĉiuj ili jam subskribis antaŭe, en la jaro 1948, la Traktaton de Bruselo, pere de kiu fondiĝis la Okcident-Eŭropa Unio.

3 Al tiuj de la Traktato de Bruselo aldoniĝis Danlando, Italio, Irlando, Norvegio kaj Svedio.

4 Nuntempe 47 eŭropaj ŝtatoj apartenas al la Konsilio de Eŭropo.

Okaze de la aliĝo de Germanio al la Konsilio de Eŭropo en la jaro 1950, oni ekigis debaton pri la lingva situacio de la organizaĵo. En la monato majo 1952 Gérard Jaquet⁵, kiu estis franca parlamentano en la Konsultiĝa Asembleo de la Konsilio kaj ankaŭ vic-prezidanto de la asocio “*Le Monde Bilingue*”⁶ proponis al la Asembleo diskuti pri la lingva situacio en Eŭropo. La Komitato pri Sciencaj kaj Kulturaj Aferoj de la Asembleo de la Konsilio de Eŭropo kreis komisionon kun 11 membroj kiuj devos pristudi la aferon kaj ellabori proponon por la Asembleo. Estas necese diri, ke la naciaj lingvoj de la membroj de la komisiono estis jenaj:

Nacia lingvo	Membroj de la komisiono
Angla	2
Franca	1
Germana	2
Nederlanda	4
Dana	1
Sveda	1

Kiel lerte priskribis D-ino Zorana Sokolovska⁷, la Konsilio de Eŭropo sendube estis la unua eŭropa organizaĵo kiu pritraktis la lingvan situacion de la kontinento kaj deziris trovi taŭgan solvon cele al la interkompreniĝo de eŭropanoj. La 10-an de septembro la komisiono definitive aprobis raporton por la Asembleo, la titolo de tiu raporto jam avertas pri ties enhavo “Starigo de eŭropa lingva komunumo bazita sur la apliko de franc-angla dulingvismo”. Tamen la decido ne ricevis unuaniman aprobon de ĉiuj komisionanoj, jen la fina balotado:

- Poraj: 6 voĉdonoj (angla, franca, sveda, dana kaj 1 nederlanda lingvanoj).
- Kontraŭaj: 5 voĉdonoj (germana kaj 3 nederlanda lingvanoj).

Fine, la komisiono proponis al la Asembleo jenon:

5 Gérard Jaquet (1916-2013), franca parlamentano kaj ministro.

6 “Le Monde Bilingue” (La Dulingva Mondo) estis franca asocio favora al la tutmonda adopto kiel komunaj lingvoj de la franca kaj la angla lingvoj.

7 Sokolovska, Z. (la 1-an de novembro 2017). Languages in “the United Nations of Europe”: debating a postwar language policy for Europe. *Language Policy*, 16, 461-480. <https://doi.org/10.1007/s10993-016-9417-z>

A. Formale agnoski komunan helplingvon por ĉiutaga uzo, kiu estos la franca aŭ la angla laŭ elekto, la adopto de tiuj lingvoj kune estas ne-deviga, ambaŭ lingvoj devas esti instruataj esence kun praktikaj celoj kaj iel ajn sen ignori la eblon studi aliajn modernajn lingvojn aŭ, ĝenerale, la diversecon kiu riĉigas la eŭropan kulturon.

B. Por certigi, ke ĉi tiu interkonsento efektiviĝos kiel eble plej baldaŭ, ĉiuj kiuj naskiĝis en france aŭ angle parolantaj ŝtatoj aŭ en aliaj membro-ŝtatoj de la Konsilio de Eŭropo ricevos instruadon ĉu en la franca, ĉu en la angla, tiel ĉiuj lernantoj povos atingi scipovon en unu el tiuj lingvoj dum siaj lernejoj jaroj.



Lernejo en eŭropa lando dum la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento

Malgraŭ la celoj sciigitaj de la deklaro, la aprobo de ĉi tiu dulingvismo ene de la Konsilio de Eŭropo ne estis unuanime akordita, ni memoru, ke la fina rezulto de la komisiono estis 6 poraj voĉoj kaj 5 kontraŭaj. Tio estas, okaze de la fina balotado franc-angla dulingvismo ricevis preskaŭ egalan subtenon ol rifuzon. Dum la debatoj la proponanto, S-ro Jaquet, asertis, ke la sud-eŭropaj popoloj sufiĉe bone komprenis la francan lingvon, ĉar ĉiuj lingvoj en tiu zono havis saman latinan originon, same tiuj de Nord-Eŭropo komprenis la anglan lingvon.

Unu el la germanaj reprezentantoj en la komisiono, S-ro Eduard Edert⁸ respondis, ke oni ne povis pripensi Eŭropon nur el la okcidenta vidpunkto.

⁸ Eduard Edert (1880-1967) germana politikisto kaj verkisto.

Li sopiris la estontan aliĝon al la Konsilio ankaŭ de tiuj landoj kiuj troviĝis tiutempe sub la sovetunia influo. Li argumentis, ke la germana lingvo estis sufiĉe disvastigita en Pollando, Rumanio kaj Hungario, kaj eĉ en Jugoslavio multaj lernejoj instruis ĝin kiel eksterlandan lingvon. Do, oni ne povis akcepti la adopton nur de du lingvoj, la franca kaj la angla, por la tuta Eŭropo. Se tiel, temus pri deviga altrudo fare de la okcident-eŭropaj ŝtatoj kaj tio povus esti komprenata de tiuj orient-eŭropaj kiel “imperiisma akto”. Sekve, kaj sendube surprize, S-ro Edert deklaris jenon:

“El la vidpunkto de tiuj ŝtatoj parolantaj nek la francan nek la anglan lingvojn, mi devas diri, ke se oni bezonas komunan helplingvon por la ĉiutaga vivo, elektu unu, ne du. Alprenu Basic English⁹, alprenu Esperanton, la sola helplingvo por ĉiutaga vivo laŭ mi scias. Mi ne parolas Esperanton, mi ne konas Esperanton, tamen mi scias, ke proksimume 900.000 homoj antaŭ ne-longe sendis peton al Unuiĝintaj Nacioj favore al la adopto de Esperanto. Ĉi tiu peto estis subskribita de la Prezidanto de la Franca Respubliko, de la Ĉefministro de Nederlando kaj de multaj aliaj famaj homoj tra Eŭropo kaj la tuta mondo. Sendube io ekzistas ene de tiu lingvo kaj mi min demandas kial la Komisiono ne konsideris ĉi tiun solvon por la problemo.”



Unuaj kunsidoj de la Eŭropa Unio

9 Basic English estas simpligita formo de la angla lingvo, kreita en 1925 de la lingvisto Charles Kay Ogden. Li diskonigis sian projekton en la jaro 1930 per la libro “Basic English: A General Introduction with Rules and Grammar”. La celo de la lingvo estas havigi al ĉiuj simpligitan konon de la angla lingvo por ĉiutaga vivo.

La reago de aliaj membroj de la Komisiono rilate la proponon por la adopto de la internacia lingvo Esperanto estis tuja. Unu el la nederlandaj reprezentantoj akceptis, ke la propono estis alloga, tamen aperus malfacilaĵoj kiel tiu de la malsimila prononco de lingvo fare de diverslandaj parolantoj, konkrete li menciis, ke italo parolanta Esperanton ne havus saman prononcon ol norvega parolanto de tiu lingvo¹⁰. Laŭ tiu reprezentanto, alia problemo kiu tute malebligis la adopton de Esperanto estas ties malgranda vorto-stoko¹¹, krome oni ne konis kapablan Esperanto-verkiston kaj eĉ ne sufiĉe bonan libron verkita en ĉi tiu internacia lingvo.

Poste la dana reprezentanto sciigis sian opinion rilate la proponon pri la adopto de Esperanto. Laŭ li, ĉi tiu internacia lingvo havis nenian eblecon esti uzata, ĉar li ne kapablis imagi, ke reprezentantoj de 17 ŝtatoj povus interkompreniĝi en Esperanto, same kiel ne eblas interkompreniĝi en la latina lingvo. Fine la irlandia reprezentanto akceptis afable la proponon pri Esperanto, sed li agnoskis ke ekzistis nenia ebleco esti aprobata.




Do, definitive la efemera propono por oficialigi Esperanton en la Konsilio de Eŭropo vanuis. Tamen, la posta respondo de S-ro Edert estis evidentaĵo. Li avertis ke, se oni adoptas dulingvan solvon, tio estas lernado de la franca aŭ de la angla laŭ propra elekto, tio neniel solvas problemon, ĉar povas okazi ke italo lernos la francan kaj norvego la anglan, do, ili tute ne povos interkompreniĝi. Tial, la solvo al la lingva problemo neniam povos baziĝi sur dulingva sistemo, do, aŭ ĉiuj estas proklamitaj kiel oficialaj lingvoj aŭ oni adoptas nur unu.

10 Pli ol 50 jaroj poste, oni povus demandi ĉu ĉi tio okazas nur rilate Esperanton, sed ne kiam oni parolas aliajn lingvojn. Sendube anglo ne prononcas same la anglan lingvon ol ruso aŭ eĉ ol skoto, sed ne pro tio la angla lingvo ne estas amase uzata en preskaŭ ĉiuj internaciaj organizoj.

11 Ĉi-kaze realiĝas la sentenco de la helena historiisto Tucidido: *“Neklereco kondutas aŭdace”*.

La nuntempa realo estas tute malsimila. La franca kaj la angla lingvoj daŭre estas la solaj oficialaj lingvoj en la Konsilio de Eŭropo, tamen aliaj tri lingvoj estas konsiderataj kiel komplementaj: la germana, la itala kaj la rusa¹². Krome la hispana kaj la greka lingvoj estas difinitaj kiel similaj al tiuj komplementaj. Kaj rilate la instruadon, la Konsilio de Eŭropo elstarigas pro sia enorma laboro en la favorigo de la lernado de lingvoj fare de europanoj¹³. Tiel, ĉi tiu organizo deklaris, ke la kapableco interkomunikiĝi per du aŭ pliaj lingvoj, eĉ se nur kun baza kono, malfermas eblojn por edukado, laboro kaj inform-ricevado. Krome, la lernado de lingvoj, tio estas ne nur de la franca aŭ de la angla, kontribuas al la disvolvigo de la toleremo kaj kompreno inter homoj de malsimilaj lingvaj originoj aŭ kulturoj, do ĉiuj devus havi la eblon lerni lingvojn.



La Eŭropa Ĉarto por Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj estas ĉarto de Konsilio de Eŭropo adoptita en 1992.

Sendube la plej grava deklaro de la Konsilio de Eŭropo rilate al plurlingvismo estas la Eŭropa Ĉarto de la Minoritataj aŭ Regionaj Lingvoj. Temas pri akordo ratifita la 5-an de novembro de 1992 celanta la defendon kaj stimulado de tiuj eŭropaj lingvoj kiuj ne estas oficialaj, aŭ se oficialaj en kelka membro-ŝtato ĝi havas malgrandan nombron da parolantoj. La Ĉarto ne inkluzivas dialektojn kaj lingvojn parolatajn nur de elmigrantoj. Ene de la Ĉarto aperas la koncepto pri “lingvo sen teritorio”, tio estas, tiuj lingvoj parolataj en membro-ŝtato, supozeble ankaŭ en membro-ŝtatoj, de malgranda nombro da homoj kaj kiuj ne povas esti enkadrigitaj sur konkreta teritorio. Ĝis nun oni konsideris lingvojn sen teritorio la jidan kaj la romian lingvojn. Tamen la difino estas perfekte aplikebla al Esperanto, do se kelka membro-ŝtato aŭ kelkaj el ili sciigas, ke Esperanto estas lingvo parolata de malgranda nombro da homoj sur ne-konkreta teritorio en Eŭropo, kaj verdire ambaŭ aferoj estas tute certaj, la Zamenhofa lingvo povus esti protektata de la Konsilio de Eŭropo.

12 La oficialeco de la rusa lingvo en la Konsilio de Eŭropo povus malaperi baldaŭ. La 15-an de marto 2022 la Parlamenta Asembleo de la Konsilio de Eŭropo voĉdonis favore al la eliro de Rusio el tiu eŭropa organizaĵo, post la invado de Ukrainio fare de Rusio. En tiu sama tago, Rusio decidis forlasi la Konsilio de Eŭropo.

13 Rekomendo 1383 (1998) de la Parlamenta Asembleo de la Konsilio de Eŭropo pri la lingva diverseco.

La Eŭropaj Komunumoj

La fondiĝo kaj eklaboro de la ĵus vidita Konsilio de Eŭropo baziĝis ekskluzive sur politikaj aferoj, celantaj ĉefe la certigon de la demokratio en la politikaj sistemoj de la eŭropaj ŝtatoj kaj la disvolviĝon de la homaj rajtoj en la kontinento, aŭ almenaŭ en tiuj ŝtatoj apartenantaj al tiu unua eŭropa organizaĵo. Tamen, en la jaro 1951 ses eŭropaj ŝtatoj¹⁴ subskribis akordon kiu celis atingi politikan unuiĝon surbaze de ekonomiaj principoj, en tiu jaro fondiĝis en Parizo la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo.

La ĉefa proponanto de tiu projekto estis la franca ministro Robert Schuman kiu estis apogita de la antaŭe malamika germana ŝtato kaj de Usono, potenco kiu finance apogis la rekonstruon de Eŭropo pere de la Plano *Marshall*.¹⁵ La celo de ĉi tiu komunumo estis la kreo de liber-komerca areo sur preciza kampo: la produktado kaj vendado de karbo kaj ŝtalo. Temis pri du ĉefaj sektoroj en la ekonomioj de la eŭropaj ŝtatoj. Pere de ĉi tiu nova internacia organizo oni difinis kiel celojn starigi komunan merkaton, forigi dogan-tarifojn kaj naciajn stipendiojn, tiel oni certigas liberan konkurencon, malaltigon de la prezoj kaj la sen-interrompan provizadon de tiuj varoj.



Fondiĝo de la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo.
Parizo 1952

La plej grava karakterizaĵo de ĉi tiu traktato estas la fakto, ke ĝi ebligis la aperon de instancoj formantaj propran komunumon, tute sendependa de la subskribantaj ŝtatoj. Tiel, oni kreis Altan Aŭtoritaton, Asembleon, Konsilion de Ministroj kaj Kortumon.

14 Francio, Germanio, Italio, Belgio, Nederlando kaj Luksemburgio.

15 La Plano Marshall, kreita de la usona ministro de eksterlandaj aferoj George Marshall kun la nomo "Programo por la Eŭropa Rekonstruo", celis la ekonomian restaŭrigon de landoj kiuj partoprenis en la dua mondmilito. Dank'al tiu programo eŭropaj ŝtatoj ricevis pli ol 13.000 milionojn da usonaj dolaroj.

Ĉi tiu agad-plano, tio estas la subskribo de internacia akordo serĉanta ekonomiajn celojn kaj kreanta novajn kaj sendependajn instituciojn, denove efektivigis en la jaro 1957. Tiam, pere de la Traktato de Romo, fondiĝis la Eŭropa Komunumo pri Atomenergio, celanta unuigi la produktadon de atoma energio, kaj la Eŭropa Ekonomia Komunumo, kiu celis la kreon de komuna merkato kie homoj, varoj, kapitaloj kaj servoj trovos nenian barilon okaze de interŝanĝoj.



Unua flago de la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo



Simbolo de la Eŭropa Komunumo pri Atomenergio

Kiel dirite la celoj de ĉi tiuj novaj eŭropaj organizaĵoj estis esence ekonomiaj, la kreado de interna komuna mekato, tio estas, ili neniel celis solvi lingvajn problemojn, tamen ekde la unua momento oni asertis, ke estontece oni atingus akordon pri la labor-lingvoj uzotaj. La fondiĝan traktaton de la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo oni redaktis en la franca lingvo kaj kvankam poste oni tradukis ĝin en la ceterajn naciajn lingvojn, la vera teksto de la akordo estis tiu franclingva. Ĉi tiu afero ŝanĝiĝis rilate la postan fondiĝon de la Eŭropa Komunumo pri Atomenergio kaj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo. La Traktato de Romo, pere de kiu fondiĝis ĉi tiuj lastaj organizoj, deklaris, ke la kvar versioj de la traktato, redaktitaj en la lingvoj franca, itala, germana kaj nederlanda, estis identaj kaj same certaj. Ĉi tiu aserto daŭriĝis okaze de ĉiu pligrandigo de la komunumoj, kiam oni substrekis ade, ke ĉiuj fondiĝaj tekstoj redaktitaj en la nuntempaj oficialaj lingvoj estas la veraj tekstoj de la traktato, malfacile kredebla aserto, se oni scias, ke temas pri 24 tekstoj, evidente ne ĉiuj povas esti tute similaj kaj redaktitaj kun identaj sencoj en ties liniaro.

La akordo atingita je la komenco de ĉi tiuj komunumoj proklamis, ke la oficialaj lingvoj de la subskribintaj ŝtatoj estus samtempe oficialaj labor-lingvoj. Ĉi tiu akordo ne akordis al la jam sekvita linio de aliaj praaj internaciaj organizoj. La plej antikvaj el ili¹⁶ uzis la francan kaj poste la francan kune kun

16 La eble plej antikva internacia organizo, la Universala Poŝta Unio, fondita en la jaro 1874 adoptis la francan kiel oficialan lingvon.

la angla kiel laborlingvojn. Ankaŭ Unuiĝintaj Nacioj, kiuj naskiĝis kelkaj jaroj antaŭ la eŭropaj komunumoj proklamis kiel oficialajn nur kelkajn lingvojn kaj en Eŭropo la Nord-Atlantika Traktat-Organizo kaj la Organizaĵo pri Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo uzis kiel oficialajn la francan kaj la anglan idiomojn.

Male, la eŭropaj komunumoj, unue tiu pri karbo kaj ŝtalo kaj poste tiu ekonomia kaj pri atomenergio, preferis deklari ke la naciaj lingvoj de ĉiuj ŝtatoj estis ankaŭ oficialaj en la eŭropaj organizoj, kaj ĉi tiu solvo daŭriĝis okaze de ĉiu pligrandigo de la komunumoj. La plena respekto al la naciaj lingvoj de ĉiuj ŝtatoj, en la samaj kondiĉoj, estas ne-ŝanĝebla principo ekde la fondiĝo de la unua eŭropa komunumo. Estas necese priatenti, ke tiuj organizaĵoj celis unuigi ekonomiajn resursojn de ŝtatoj kiuj antaŭ ne-longe, kaj ekde multaj jarcentoj antaŭe, estis malamikoj kaj subtenis militon post alia. Do, kiu ajn akordo inter deĉiamaj malamikoj nepre devis baziĝi sur kompleta kunfido kaj kun la certeco, ke neniu ŝtato, ĉu granda ĉu malgranda, ĉu riĉa ĉu modesta, havus pli da rajtoj ol la aliaj. Kompreneble, la respekto al la naciaj lingvoj estis fundamenta bazo por tiu reciproka respekto. Tiel, la kvar oficialaj lingvoj de tiuj unuaj ses ŝtatoj fariĝis la oficialaj lingvoj de la eŭropaj komunumoj.

Konscie, la unua reglamento¹⁷ aprobita de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, CEE 1/58, aranĝis la lingvan reĝimon de la organizo. Tie oni difinis la lingvojn oficialajn, la labor-lingvojn kaj kiamaniere uzi ilin. Do, la unua decido de organizo kiu pritraktus ekonomiajn aferoj estis klarigi lingvajn aferojn pro la fakto, ke estis tute necese determini kiujn lingvojn estus uzotaj de la komunumo kaj ĉefe kiun lingvon povis uzi la eŭropaj civitanoj, se ili adresis al la novaj eŭropaj komunumoj.

Oni devas elstari la fakton, ke en la komenco oni ne adoptis la anglan¹⁸ kiel oficialan lingvon. Unuiĝinta Reĝlando aliĝis al la eŭropaj komunumoj en la jaro 1973 kaj nur okaze de tiu aniĝo oni deklaris la anglan lingvon, kune kun la dana, kiel oficialan. Ni povus prirevi la lingvan situacion de la komunumoj en la jaroj 1951 kaj 1957 se Unuiĝinta Reĝlando tiame estus fondinta membro, verŝajne tiuj lingvoj deklaritaj kiel oficialaj, aŭ almenaŭ la labor-lingvoj, estus la franca kaj la angla, laŭ la modelo adoptita de la praa Konsilio de Eŭropo.

17 La unua artikolo de tiu reglamento tekstis jene: La oficialaj kaj la laboraj lingvoj de la institucioj de la komunumo estas la germana, la franca, la itala kaj la nederlanda lingvoj.

18 La angla lingvo estas oficiala en la eŭropaj komunumoj ekde la jaro 1973, okaze de la aliĝo de Britio, Irlando kaj Danlando.

Kompreneble nuntempe, kiam la *briteliro*¹⁹ estas ĵusa, la adopto de la angla lingvo kiel ununura laborlingvo, aŭ kune kun la franca, estus propono malfacile aprobota de la ŝtatoj de Eŭropa Unio, ĉefe pro la ekonomia forto de Germanio kaj pro la fakto, ke post la briteliro, la angla lingvo nur estas kun-oficiala en Malto kaj en Irlando. Krome, el la statistika vid-punkto, la germana estas la idiomo kiun pli granda nombro da eŭropanoj havas kiel nacian.



La 1-an de februaro 2022 Britio forlasis la Eŭropan Union

La sinsekvaj pliigoj de la eŭropaj komunumoj, nuntempe ĉiuj unuigitaj sub la komuna nomo *Eŭropa Unio*, ne modifis la juran situacion de la lingvoj. Tiel, ĉiuj oficialaj lingvoj de la eŭropaj ŝtatoj estas ankaŭ oficialaj lingvoj de la Unio kaj kompreneble ankaŭ labor-lingvoj. Tio provokas, ke milionoj da paĝoj devas esti tradukitaj ĉiujare en ĉiujn lingvojn kaj ankaŭ disponi pri tre kompetenta skipo de tradukistoj, kvankam pro la ekzisto de 24 oficialaj lingvoj en la Unio ofte aperas debato pri la neceso elekti unu aŭ kelkajn el ili kiel labor-lingvojn.

La Eŭropa Parlamento

Kontraste kun tio, kion ni jam vidis antaŭe pri la mencio de la internacia lingvo Esperanto dum la unuaj jaroj de la Konsilio de Eŭropo, la Zamenhofs lingvo neniam estis proponata, verŝajne eĉ ne menciata, ĉe la eŭropaj komunumoj. Tamen, ekzistas eŭropa institucio kiu eĥas la protekton de ĉiuj lingvoj, ne nur de tiuj 24 oficialaj lingvoj, sed ankaŭ de tiuj kiuj apartenas al minoritatoj kaj ankaŭ tiuj, kiel Esperanto, kiu ne estas parolata sur konkreta teritorio, temas pri la Eŭropa Parlamento.

La Eŭropa Parlamento estas unuĉambra institucio kiu reprezentas la popolojn de la membro-ŝtatoj de la Eŭropa Unio. Tio estas, la eŭropanoj rekte, ne la registaroj, elektas la membrojn de la Parlamento. Ĝia sidejo troviĝas en Strasburgo (Francio) kvankam ekzistas sidejoj ankaŭ en Bruselo kaj en Luksemburgo. Ĉe la Parlamento renkontiĝas 750 membroj elektitaj rekte kaj demokratie de la civitanoj de la Eŭropa Unio. La parlamentanoj grupiĝas laŭ politikaj kredoj kaj ne laŭ nacioj.

Rilate la lingvan statuson de la Parlamento, ĉiuj parlamentanoj rajtas esprimi sin per kiu ajn el la 24 oficialaj lingvoj de la Unio. Inverse, ĉiuj ili rajtas ricevi tradukaĵon en sian lingvon de la paroladoj de aliaj parlamentanoj. Kiel ĉiuj aliaj parlamentanoj ankaŭ tiu eŭropa povas ricevi konsultojn de civitanoj, kiuj siafoje rajtas ricevi respondon. Sur ĉi tiu tereno la Eŭropa Parlamento plenumis grandan laboron celanta prizorgi ĉiujn lingvojn, naciaj aŭ ne, oficialaj aŭ ne, de Eŭropo. Estas necese diri, ke la Eŭropa Parlamento sekvas lingvan politikon favore al plurlingvismo, tiel ĉiuj lingvoj estas same gravaj. Tiel, la 24-an de marto de 2009 la Eŭropa Parlamento aprobis jenan rezolucion *“Plurlingvismo: avantaĝo por Eŭropo kaj komuna kompromiso”*. Unu el la petoj de la rezolucio adresas al la Eŭropa Komisiono kun la peto favorigi la lingvan diversecon en Eŭropo. Dum la diskutoj pri tiu rezolucio, la slovena parlamentano Ljudmila Novak²⁰ prezentis proponon favore al la akcepto de la lingvo Esperanto kiel komuna lingvo de la Eŭropa Unio, pro la fakto ke *“la principo pri egal-rajteco ne povas esti garantiata se oni uzas ĉefe nacian lingvon kiel lingua franca”*²¹.

Ŝi subtenis ankaŭ, ke oni devas *“konsideri la eblon kaj utilon de la adopto fare de la Eŭropa Unio de konstruita komuna lingvo, kiel Esperanto. Nur ĉi tiu lingvo povas faciligi la komunan interkompreniĝon inter eŭropanoj kaj homoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas facile lernebla kaj uzebla.”*. S-ino Novak mem klarigis al esperantistaj ĵurnaloj, ke sendube estos malfacile aprobebla tiun proponon, tamen ĝi estas utila por ekigi debaton pri la problemoj de la uzado de multaj lingvoj kaj la solvo trovebla dank'al Esperanto. Fine la Eŭropa Parlamento rifuzis la proponon, tamen ĝi ricevis apogojn, inter aliaj de la itala parlamentano Marco Cappato²².

20 Ljudmila Novak (1959) estas slovena politikistino, inter la jaroj 2004 kaj 2009 ŝi estis membro de la Eŭropa Parlamento. Ekde la jaro 2008 ŝi estas membro de la partio Kristana Popola Partio Nova Slovenio. Ŝi lernis Esperanton dum la junaĝo.

21 *Lingua franca* estas tiu lingvo adoptita de kelkaj komunumoj por utili kiel helplingvo.

22 Marco Cappato (1971) estas itala politikisto membro de la partio “Italaj Radikaluloj”. Li estis membro de la Eŭropa Parlamento inter la jaroj 1999 kaj 2009.



Ljudmila Novak



Marco Cappato

Ne nur al la oficialaj lingvoj dediĉas sian atenton la Parlamento, sed ankaŭ al tiuj kiujn oni povas kvalifiki kiel minoritatajn lingvojn. La Rezolucio de la 11-a de septembro de 2013, pri la eŭropaj lingvoj sub minaco de malapero kaj la lingva diverseco de la Eŭropa Unio, petas al la membro-ŝtatoj atenti al tiuj lingvoj kiu riskas malaperi kaj ankaŭ favorigi la diversecon de la lingva havaĵo de la Unio. Simila enhavo al tiu rezolucio troviĝas sur alia²³ aprobita en la jaro 2018. La konkretaj agadoj celantaj protekti minoritatajn lingvojn en la Parlamento²⁴ favorigis la oftan uzon de tiuj lingvoj en la Parlamento kaj ankaŭ la rajto de eŭropanoj demandi kaj ricevi respondon en lingvo ne oficiala en la Eŭropa Unio, sed kunoficiala en kelka membro-ŝtato²⁵.

Ni povus pristudi la temon, ĉu Esperanto povus esti konsiderata kiel minoritata lingvo en Eŭropo, se tiel, sendube ĝi meritus la atenton, la protekton kaj, eĉ eblas pensi, la estontan akcepton de la Eŭropa Parlamento. Sendube esperantistoj ne estas etna minoritato, tamen tiuj rezolucioj parolas ne nur pri lingvoj de minoritatoj sed ankaŭ pri lingvoj kun malgranda nombro da parolantoj, spite al la etna komuneco de ties parolantoj. Tamen neniu dokumento de Eŭropa

23 Rezolucio de la 7-a de februaro de 2018, pri protektado kaj ne-diskriminacio de minoritatoj en la membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio.

24 Oficialaj raportoj de la Eŭropa Parlamento informas ke, ĝis nun, oni uzis en ĉi tiu organizo 48 lingvojn, do, multaj pli ol la 24 oficialaj de la Eŭropa Unio.

25 La Prezidanta Tablo de la Parlamento decidis la 3-a de julio de 2006 akcepti petojn de eŭropanoj en la kunoficialaj lingvoj en Hispanio, tio estas la kataluna, la eŭska kaj la galega. Kompreneble, tiuj civitanoj rajtas ricevi oficialan respondon ankaŭ en tiuj lingvoj.

Unio parolas pri *“lingvoj sen teritorio”*, kiel la Eŭropa Ĉarto de la Minoritataj aŭ Regionaj Lingvoj de la Konsilio de Eŭropo antaŭe pritraktita. Do, oni priantas kvantan kriterion kaj ne nur tiun etnan aŭ geografian. Tiel, se paroli pri lingvoj parolataj de malgranda nombro da homoj sendube Esperanto estas ekzemplo pri tio.

Pro ĉi ĉio, la Eŭropa Parlamento estas la plej taŭga eŭropa institucio kie Esperanto povus ludi ian rolon, eĉ se tiu rolo nur estus, almenaŭ komence, admisii la eblon adresi demandon aŭ peton al Parlamento en la internacia lingvo, kompreneble tio ankaŭ signifus ke la alparolanto rajtus ricevi respondon en Esperanto. Kaj ĉi ĉio ne ŝajnas ne-atingebla afero.

Resume, estas necese konsenti, ke la subteno de la nuntempa lingva politiko en Eŭropo estas tre respektama kun la eŭropaj civitanoj, pro la fakto, ke ne estas nepre koni la plej devastigitajn lingvojn²⁶, sed ankaŭ estas bezonataj grandaj monaj kvantoj por subteni ĝin. Ofte, duon-serce, duon-serioze, oni asertas, ke estus necese krei novan lingvon²⁷ por esti uzata nur ĉe la eŭropaj institucioj. Do, oni sentas la neceson uzi komunan lingvon, tamen kun la nepra kondiĉo ne nuligi la riĉan lingvan kulturon de la eŭropanoj. *“Por tio ni jam havas la anglan lingvon”* estas devastigita krio, sed, ĉu tio okazas ankaŭ nun kiam Unuiĝinta Reĝlando jam forlasis la Eŭropan Union?

Ĉiu jarkvino, jen la oficperiodo de la parlamentanoj, unu aŭ kelkaj el ili prezentas peton por oficialigi Esperanton. Verŝajne tiu celo ankoraŭ ŝajnas esti malproksima, tamen, tio kio ja povas esti atingota estas la rajto kontakti kun la Eŭropa Parlamento ankaŭ en Esperanto, kiel en la eŭska, en la cigana aŭ en la samea lingvoj. Verdire tio ne ŝajnas esti lontana celo kaj sendube ĝi estus la unua paŝo por la enirigo de la internacia lingvo en la Eŭropan Parlamenton, do en la eŭropajn instituciojn.

26 Por konfirmi jenon ni konu la kazon pri la datum-bazo de ŝoforoj de la Parlamento de la jaro 2016. Nu, la 14-an de aprilo de 2016 la Eŭropa Parlamento sciigis sian pretecon ellabori datum-bazon de kandidatoj por esti dungitaj kiel ŝoforoj. Inter aliaj aferoj, oni metis kiel nepran kondiĉon paroli bonege du oficialajn lingvojn de la Eŭropa Unio kaj sufiĉe bone kompreni la anglan, la francan aŭ la germanan lingvojn. Krome, la Eŭropa Oficejo por Dungado de Laboristoj disponigis sian TTT-paĝon nur en la angla, franca kaj la germana lingvoj rilate la aliĝon al tiu datum-bazo. Hispanio plendis pro la fakto, ke la elekto de tiuj tri lingvoj, do la rifuzo de ĉiuj aliaj oficialaj lingvoj, reprezentis lingvan diskriminacion en la Eŭropa Parlamento, kie, supozeble, ĉiuj lingvoj ĝuas saman kategorion kaj ĉiuj oficialaj lingvoj povas esti uzataj. La Ĝenerala Advokato de la Eŭropa Kortumo akceptis la plendon de la hispana registaro.

27 Tiel naskiĝis *Europanto*. Temas pri internacia planlingvo proponita en 1996 de Diego Marani, tradukisto de la Eŭropa Unio en Bruselo. La nomo de la lingvo celas esti simila al Esperanto. El la gramatika vidpunkto la lingvo estas piĝino, ne ekzistas fiksitaj reguloj.



Jura Fakultato en la Universitato McGill
Montrealo (Kanado)





Ĵurio

Ĵurio estas aro da simplaj civitanoj, elektitaj por verdikti en tribunalo pri la kulpeco de akuzito, apogante sin nur sur la decido de sia konscienco.

La membroj de ĵurio estas ĵurianoj.

Tipoj de ĵurioj:

- Tradicia ĵurio: unuamomente, ĵurio devis nur respondi la demandon, ĉu la akuzito estas kulpa aŭ senkulpa. Tamen, nuntempe, ĵurio respondas demandaron, kiu celas decidi pri la kulpeco/senkulpeco de la akuzito, sed ankaŭ pri eblaj cirkonstancoj kiuj povas modifi ties eblan respondecon.

- Miksta ĵurio: estas membroj de ĉi tiu ĵurio ne nur simplaj civitanoj, sed ankaŭ fakuloj pri juro. Ĉi-kaze ĵurianoj decidas, per plimulto el voĉodonoj, ne nur pri la kulpeco de la akuzito, sed ankaŭ pri la ebla puno.

Speciala tipo de miksta ĵurio estas tiu, kiu ĵurianoj -simpla civitanoj kaj fakuloj pri juro- decidas unue pri la kulpeco/senkulpeco de la akuzito, poste, se li estas kulpa, nur la fakuloj pri kuro decidas pri la puno.

Laŭ la funkcioj de la ĵurio, ĉi tiu jura instanco povas esti:

- Ordinara ĵurio: temas pri tiu aro da ĵurianoj kiuj decidas simple pri kulpeco/senkulpeco de akuzito kaj eventuale pri la trudota puno.

- Granda ĵurio: en Usono kaj Liberio, temas pri jura instanco kies ĉefa celo estas decidi pri la akuzo kiu povas esti proponita kontraŭ iu. Poste, ĉi tiu ĵurio aŭ alia pristudos kaj decidus ties eblan kulpecon.

- Kron-komisara ĵurio: temas pri jura instanco, kies celo estas asisti kron-komisaron en la decido pri la kaŭzoj de ies morto. Tio estas, ĉu temis pri natura morto aŭ pri murdo.

- Speciala ĵurio: estas membroj nur fakuloj pri konkreta branĉo (ekz. komercistoj, metiistoj...), kies celo estas decidi pri kulpeco/senkulpeco de akuzito kiu apartenas al tiu sama fako.

Pri la ĵurianoj.

En preskaŭ ĉiuj landoj, kie ekzistas ĉi tiu jura instanco, civitano havas rajton kaj devon esti ĵuriano. Normale, ĵurianoj estas elektitaj per balotado inter civitanoj. Kompreneble, el tiuj civitanoj ne-plenaĝuloj aŭ maljunuloj ne povas esti elektitaj. Ankaŭ homoj kun kelkaj labor-okupoj, ekzemple juristoj aŭ politikistoj, ne povas esti ĵurianoj.

Post la balotado, estas elektitaj aro da homoj, el kiuj post intervjuo ĉe la tribunalo, kaj la defendanto, kaj la akuzanto kaj la prokuroro rajtas demeti konkretan nombron da ili. Tiu forigo devas esti bazita sur konkretaj kialoj, ekzemple, la kandidato ne estas senpartia, tiu estas tre bone informita pri la kazo, ktp.

Rilate la nombron da ĵurianoj, tio dependas de la jura sistemo de ĉiu nacio. En Hispanio kaj Argenino estas membroj de ĉiu ĵurio 9 homoj; en Usono 12 -kvankam ne ĉiam-; en Meksikio 7 homoj.

Ĝenerale, ĵurianoj ricevas nenian monan kompenson dum la tagoj kiam ili agadas ĉe la tribunalo. En Usono kaj en aliaj landoj, ili povas ricevi malgrandan kvanton da mono, sufiĉe por kovri eblajn kostojn por manĝado, restado, vojaĝoj dum tiuj tagoj, ktp.

Kunlaboru kun JURA TRIBUNO INTERNACIA

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monatoj julio/aŭgusto 2022, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato junio 2022.

Nia ret-adreso: jurista@esperanto.ac

Galerio de elstaraj esperantistaj juristoj



Hilary “Bill” Chapman

Brito, 1950 ~ 2020

brita instruisto, paciga juĝisto, socia aganto, urbestro de Conwy (Kimrio) kaj esperantisto; ĉefdelegito de UEA por Britio, esploranto de la historio de Esperanto, aŭtoro de la libro *The Early History of Esperanto in the United Kingdom* (2019)



La Juĝisto

**Kino
kaj**



Juro

Hank Palmer (Robert Downey Jr.) estas klera advokato en granda urbo. Li estas sperta pri defendo de koruptaj potenculoj antaŭ tribunaloj. Por li leĝoj povas esti taŭga monprofita negoco, tute ne gravas ĉu justico estas plenumita aŭ ne. El familia vidpunkto, la edzino de Hank deziras divorci de li, sed li ege volas lukti pro sia amata filineto.

Li ricevas telefon-alvokon de sia frato. Li estas informita pri la ĵusa forpaso de ilia patrino, do, li decidas reveni en sian naskiĝ-vilaĝon, tie loĝas lia patro kaj fratoj, sed tute forgesitaj al li. La advokato planas resti en la vilaĝo nur dum kelkaj tagoj. Dum tiuj tagoj la patro -prestiga juĝisto- estas akuzita pro murdo okaze de trafik-akcidento, li stiris aŭtomobilon tute ebria. Hank akceptas defendi lin, kvankam ili ne tre bone interrilatas de antaŭ multaj jaroj.



Dum la proceso la advokato eltrovas, ke la patro (Robert Duvall) ege malsanas. En sia naskiĝ-vilaĝo li ankaŭ renkontiĝas kun sia antaŭa fianĉino, patrino de infano, tiam Hank ekscias, ke verŝajne li estas la patro de tiu infano.

The Judge. (2014) Produktita de Village Roadshow Pictures. Reĝisorita de David Dobkin. Ĉefaj aktoroj: Robert Downey Jr., Robert Duvall, Vera Farmiga, Vincent D'Onofrio, Jeremy Strong, Dax Shepard, Billy Bob Thornton.

Kvankam la agado kiel defendanto de Hank estas perfekta, la akuzito akceptas, ke li deziris la morto de la viktimo, do, fine la patro -eksa juĝisto- estas kondamnita al kvar jaroj de mallibero.

Verdire "La Juĝisto" estas dramo, kiu pritraktas la malfacilajn rilatojn inter patro kaj filo. Ankaŭ spertoj travivitaj dum junaĝo aperas kiel fundamentaj por la vivo de kiu ajn, kvankam ili ŝajnas esti forgesitaj. Kaj, se paroli pri juraj temoj, la filmo prezentas jenajn demandojn: Kio estas justico? Kio estas leĝeco?



Robert Downey Jr kaj Robert Duvall (advokato kaj akuzito)

En la filmo, la advokato Hank Palmer sekvas striktan leĝecon, male, lia patro aplikis, dum sia tuta vivo kiel juĝisto, la justicon. Por Hank, leĝeco estas uzinda ilaro por defendi sian klientaron; por la patro, tio kio vere gravas estas la justico, ĉar leĝoj povas esti misuzataj per procesaj artifiko.

La fino estas plena je emocio. La patro akceptas, ke lia filo estas la plej lerta advokato de li konata, kiam li tion asertas, li milde forpasas. Hank revenas en la kortumon kaj la filmo finiĝas per rigardo de Hank al la ne-okupita seĝo de la patro, kiu estis juĝisto dum 40 jaroj. Verŝajne, tiu bildo pensigas, ke eble li deziras esti la nova juĝisto por apliki justicon kaj ne nur uzi la leĝecon.

ALIĜU AL INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu rajtas esti membro de I.J.E.A.?

- Ordinara membro: devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.
- Membro-studento: devas studi por licenciigo pri Juro.
- Membro-staĝanto: devas staĝi en jura profesio.
- Membro-korespondanto: devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperanto, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.

Kiel aliĝilo plenumu la sekvantan paĝon kaj sendu ĝin al
jurista@esperanto.ac

Kotizoj.

La jara kotizo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko. Se vi loĝas en alia lando la kotizo estas 14 eŭrojn.

Membro-studentoj aŭ membrostaĝantoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r. Ankaŭ oni povas aboni la jaran kotizon rekte okaze de la Ĝenerala Asembleo kiu ĉiu-jare okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso: *jurista@esperanto.ac*





Internacia Jurista Esperanto-Asocio I.J.E.A.

ANIĜILO / MEMBRILO

Foto

Antaŭnomo:

Familia nomo:

Profesio:

Poŝtadreso:

Retadreso:

@

Urbo:

Lando:

Nacieco:

Kategorio de estonta asociano: ordinara asociano jurstudento
staĝanto korespondanto

Mi, pere de ĉi tiu peto, kandidatiĝas al la statuso de membro de IJEA obeonte ties statuton kaj pagonte la ĉi-suban kotizon.

Jarkotizo (se ordinara membro de ne-esceptaj landoj) 14 eŭroj
(se ordinara membro de iamaj socialismaj
orient-eŭropaj landoj, Azio -escepte Koreio,
Japanio kaj Israelo), Afriko kaj Latinameriko..... 7 eŭroj

Pagmaniero: Eblas ĝiri al UEA-konto **ejax-r**

Subskribo de la kandidato

Decido pri la kandidateco
per subskribo de IJEA estrarano

Sekretario-Kasisto: jurista@esperanto.ac
Prezidanto: mfb@debastosadvogados.com

**Internacia Jurista Esperanto-Asocio
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**